

Esperanto en Danio

11-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2004



Komuna foto de la jarkunveno 2004

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16
✉ dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Peter Weide (vicprezidanto)
Ina Schultz (kasisto)
Jytte Sunekær (sekretario)
Ejnar Hjorth
Werner Madsen
Torben Svendsen

Anstataŭantoj:

Bent Jensenius
Ana Røssum

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40
✉ eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58.
✉ ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero:
10.11.2004**

Enhavo

Lande

Lastatempaj agadoj de DEA...	3
La Revuservo de DEA en transiĝa tempo	4
Protokolo de la Ĝenerala kunveno de DEA	7
La prelegoj en la jarkunveno	11
El mia esperantista vivo	12
Nekrologoj	17

Loke

Kopenhago.....	19
Århus	21
Næstved	22

Monde

UK en ĉina urbego	23
Nova estraro de UEA.....	24
IJK en rusa arbaro	25
Pri la manifestacio Eŭropa Bunto 2004.....	27
Kunven-kalendaro	29
40-procenta kresko ĉe “Google”	30

Anoncoj

Internacia Fotokonkurso	31
“El nia bretaro”	32

Lastatempaj agadoj de DEA

Distribua subvencio al EeD

Kiel ni informis antaŭe, la sendokostoj de revuoj plialtiĝis komence de la jaro. En aprilo la Biblioteka Administracio (Biblioteksstyrelsen) anoncis ke asocioj povas petskribi por ricevi subvencion, kaj kompreneble ni tuj petskribis, eĉ se tio ŝajnis vana. Sed fine de junio ni spertis kun ĝojo ke la respondo estis pozitiva, kaj ni ricevus subvencion por 2004! La ricevita monsumo egalas la diferencon inter la malnova kaj la nova sendokosto.

La balotoj de la EU-parlamento

DEA kaj unuopaj estraranoj skribis al la plej verŝajne (re)elektotaj danaj EU-parlamentanoj. Bedaŭrinde la pli granda parto de ili respondis ke ili akceptas la anglan kiel komunan lingvon, ĉar ili opinias ke ĝi praktike jam estas tia.

Kelkaj tamen skribis ke ili tamen favoras ke la naciaj lingvoj estu reprezentitaj en la parlamento. Inter la favoraj parlamentanoj estas Jens Peter Bonde de la grupo EDD, kiu jam en marto/aprilo subskribis pozitive. Du nove elektitaj socialdemokrataj parlamentanoj estas iom favoraj: Britta Thomsen asertis ke ŝi pritraktos positive la enkondukon de Esperanto inter la aliaj lingvoj. Nia eksĉefministro Poul Nyrup Rasmussen, kiu ricevis la plej grandan nombron da personaj voĉoj en la baloto, ne imagas Esperanton kiel pontolingvan alternativon pro la eventualaj kostoj de tiu solvo, sed esperas ke la eŭropaj Esperanto-asocioj daŭre sukcese laboru por la disvastigo de Esperanto en Eŭropo, ĉar tiel iam Esperanto certe atingos disvastiĝon en la institucioj de EU!

La balotoj kaŭzis intereson pri la lingva problemo ankaŭ aliloke. En la 30-a numero de "Sprogforum", faka revuo pri fremdlingva pedagogio, la ĉefartikolo estas verkita de la prezidantino de DEA kaj

havas la titolon “Esperanto kaj la EU-plilarĝigo”. Ĝi informas pri la deveno de Esperanto, la iniciatoj de Gianfranco dell’Alba kaj de Eŭropa Bunto (v. p. 24-5 de la pasinta numero de EeD), kaj fine citas Sean O’Rian, la prezidanton de EEU, ke eĉ en Irlando, kie ĉiuj parolas flue la anglan, ekzistas granda movado kiu ne akceptas ke la angla lingvo “venkis”.

La ĉi-jara Zamenhof-festo en Kopenhago

Laŭ propono de la kopenhagaj kluboj la prezidanto de DEA kontaktis la polan ambasadejon por esplori ĉu ĝi povus gastigi la Zamenhof-tagon okaze de la 50-jara datreveno de la Montevidea rezolucio. La respondo estas ĝojige pozitiva, kaj ni ellaboras programon kiun ni priparolos detale en la venonta n-ro de EeD.

Ileana Schröder

La Revuservo de DEA en transiĝa tempo

La celo de tiu ĉi artikolo estas fari bilancon pri La Revuservo de DEA – parte por informi pri la stato de la servo kaj ĝia laboro, parte por informi pri ĝia transiĝo de Frederik Hoffmann Eriksen al Arne Casper. Ĉar eble ne estas klare por ĉiuj, kio estas La Revuservo de DEA, jen mi klarigos:

La Revuservo de DEA havas du celojn: Plifaciligi la vendadon de nedanaj E-revuo(j) en Danio kaj plifaciligi al danoj aboni eksterlandajn Esperanto-revuo(j)jn. Por tiel diri, La Revuservo de DEA peras la menciitajn revuo(j)jn. Tio signifas, ke abonemulo simple devas informi la servon (t.e. antaŭe Frederik Hoffmann Eriksen, nun Arne Casper) pri tio, ke li volas aboni je revuo(j), kaj poste pagi por ĝi/ili (ekzemple, kaj plej ofte, per ĝirilo).

La mendorondo 2004

”La mendorondo 2004” estas mia nomigo de la laboro rilate al la abonoj de 2004. La 9-an de novembro 2003 mi dissendis al antaŭaj abonantoj kaj homoj, kiuj antaŭe informis min pri tio, ke ili ŝatus

aboni per la servo, ĝirilon kaj leteron kun listo kaj prezoj de la aboneblaj revuoj.

En 2004 la jenaj revuoj estis aboneblaj: Esperanto, La Espero, Fonto, Heroldo de Esperanto, INTER NI, La Jaro, Juna Amiko, La Kancerkliniko, Komencanto, Kontakto, Literatura Foiro, Litova Stelo, Monato, La Ondo de Esperanto, Oomoto, Ret-Info, TEJO Tutmonde.

Estus dezirinde, ke mi ankaŭ estus sendinta al Esperanto en Danio similan artikolon kun prezlisto de la revuoj. La daŭra problemo en tiu rilato estas ricevi aboninformojn de la perataj revuoj tiom frue, ke mi povas fari tian liston. Mi lastjare taksis, ke tio ne eblas. Mi esperas, ke mia transpreninto kapablos solvi tiun problemon pli bone ol mi.

La 21-an de decembro 2003 mi dissendis al la revuoj listojn pri abonantoj, kiuj jam pagis por siaj abonoj. Estas ĉiam malfruuloj, kaj mi ne volis, ke la ĝustatemppagintoj suferu pro ili – parte ĉar mi multfoje estis kritikita pro tio. La 8-an de marto 2004 mi sendis al la revuoj la nomojn de la malfrupagintoj, kaj mi tiam ankaŭ transdonigis al ili la abonkotizojn.

La abonantnombroj de 2004 aspektis tiel ĉi: Esperanto (0), La Espero (1), Fonto (3), Heroldo de Esperanto (8), Inter Ni (1), La Jaro (2), Juna Amiko (1), La KancerKliniko (2), Komencanto (2), Kontakto (0), Literatura Foiro (8), Litova Stelo (1), Monato (18), Ondo de Esperanto (7), Oomoto (1), Ret-Info (0), TEJO Tutmonde (0). Oni povas diskuti, ĉu indas daŭrigi la peradon de la revuoj, kiuj ne havis abonantojn (la perado do signifas, ke homoj havas la eblon aboni la revuojn). Ankaŭ tiun decidon mi transdonis al la transpreninto de la servo.

La enspezoj de La Revuservo de DEA rilate al la mendorondo 2004 estis 12 910 kronoj, kaj la elspezoj al revuoj estis 10 945,75 kronoj. La diferenco estas pro tio, ke la plimulto de la revuoj pagas al la peranto 10% aŭ 20% de la prezo de la revuo kiel makleraĵon. Tiun monon mi neniam prenis mem, sed lasis en la konton de la Libroservo de DEA, kun kiu La Revuservo de DEA havas komunan ekonomion. Krome, de la enspezo de La Revuservo de DEA estis elspezoj por lettersendado, transdonkotizoj ktp., kaj tial oni ne simple

povas subtrahi la supre menciitajn elspezojn de la enspezoj por havi la profiton de la mendorondo 2004.

Transiĝo

La 16-an de majo La Revuservo de DEA estis transigita de Frederik Hoffmann Eriksen al Arne Casper (la adresoj de ambaŭ estas menciitaj sube en la artikolo). La kaŭzo, kial mi (Frederik Hoffmann Eriksen) ne deziris daŭrigi la laboron, estas, ke mi estas tro okupata de mia studo.

Kvankam verŝajne ne estas mi, kiu devus danki, mi ŝatus ĉi tie esprimi mian ĝojon pro la laboro kun La Revuservo de DEA, kiun mi nun faris dum pli ol kvin jaroj. Mi mem transprenis laboron de Christian Ræder Clausen en 1999 laŭ estrara decido, kiu estis farita tiun jaron je kunveno en Himmerlandshus. Kiam mi transprenis la laboron, mi devis multon fari – ne laste ĉar mia antaŭulo lasis min mem eltrovi, kiel la laboro estas farata. Tio tamen bonis, ĉar mi per tiu ĉi laboro eltrovis nemalmulton pri organizo kaj laborritmoj – ekzemple (mi almenaŭ esperas, ke mi tion eltrovis), ke ne indas fari pli aŭ esti pli akurata, ol postulas la tasko, kaj ke ĝustatempeco endas. Ankaŭ, mi per tiu ĉi tasko venis en la Esperanto-mondon. Mia lingva nivelo tiam estis ne tre bona, kaj subite mi devis esprimi min pri ekzemple financaj aferoj en nia lingvo – sed mi kreskis kun la tasko, kaj mi pensas, ke mi ĝuste per tiu ĉi tasko komencis vere aktivi pri Esperanto.

Mi klopodis transdoni la servon al Arne Casper tiel, ke por li estos kiom eble plej facile eklabori pri ĝi. Mi esperas, ke la abonantoj fojfoje esprimos sian estimon de la laboro – la Revuservo de DEA ja postulas de sia administranto senpage jare almenaŭ 5-10 labortagojn. Fine mi ŝatus danki mian familion, miajn amikojn, la esperantistojn kaj miajn kunlaborantojn ĉe la revuoj, kiuj helpis min.

Adresoj:

Frederik Hoffmann Eriksen, ISP, Ryvangs Allé 1-3, DK-2100
København Ø.

Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. TV, DK-2100 København Ø.

Frederik Hoffmann Eriksen

Protokolo de la Ĝenerala kunveno de DEA

Okazinta dimanĉe la 25-an de aprilo, je la horo 9.30
en la Migrulhejmo de Aalborg.

1. Kiel kunvena gvidanto estis elektita Stanisław Mielczarek el Århus.
2. Kiel protokolantojn oni elektis Jens S. Larsen kaj Bent Wiinberg.
3. La prezidantino prezentis detale la tutlandajn partojn de la jarraporto. Ŝi aldonis ke nun Eliza Kehlet okupiĝas pri kompilado de dana-Esperanta vortaro; ke deko da danoj partoprenos la EEU-kongreson en Bilbao venontan aŭguston; ke la Esperanto-kurso en RUC plej verŝajne ripetiĝos; ke antaŭ unu semajno 250 libroj estis transdonitaj el la biblioteko de KEK al tiu de RUC; kaj ke la libroj de nia Libroservo nun troviĝas en la hejmo de la prezidantino. Rilate al la EU-parlamentara agado ŝi substrekis la helpon kiun ŝi ricevis de Peter Weide el Melby, kaj cetere menciis la sugeston de Flavio Rebelo pri iu “premio Blinkenberg”, asignebla al tiu persono kiu faris la plej stultan eldiron pri Esperanto dum la jaro.

Pri la hejmpaĝo Byrial Jensen el Langå deziris pli da enhavo, precipe en la enirpaĝo, pli da ligoj, kaj pli da informoj pri la kluboj. Jytte Sunekær krome deziris pli da Esperantaj tekstoj en la hejmpaĝo. Torben Svendsen respondis ke la hejmpaĝo estas konstruata iom post iom, kaj ke ĝi devas esti facile modifebla de neprofesiulo. Byrial deklaris sin preta helpi pri la ellaborado de la hejmpaĝo. – Byrial Jensen ankaŭ demandis kial la DEJO-membrokunveno okazas samtempe kun la ĝenerala kunveno de DEA, kaj la prezidantino respondis ke la DEJO-anoj mem petis tion. – Fine la prezidantino petis komentojn pri la membreto. Stanisław Mielczarek trovis ke la kontakto kun lokaj kluboj pliboniĝis kaj laŭdis la redaktorojn de EeD kaj Esperanto-nyt. Torben Svendsen opiniis ke EeD estas grava ligilo inter la membroj kaj proponis plivastigi la temaron, ekzemple per beletra literaturo.

Birthe Lapenna el Frederiksberg faris tutkoran dankon al la

estraro pro ilia granda laboro, kaj la jarraporto estis aplaŭde aprobita.

4. La kasistino prezentis la jarajn kalkulaĵojn de DEA por 2003. La Noll-fonduso ricevis propran kalkulaĵon, kaj la nombro de bankkontoj estas reduktitaj de kvin al du. Notinde estas ke EeD kostis iom pli ol la tuta enspezo de kotizoj; la profiteto de 55 DKK ŝuldiĝas al interezoj kaj kurzaj gajnoj. – La kalkulaĵon de la Libro servo prezentis Arne Casper, atentigante ke la indikita valoro de la stoko estas takso.

Okazis iom da klarigaj demandoj kaj respondoj pri la kalkulaĵo de la Libro servo, kaj oni ekdiskutis kiel malpliigi la elspezojn kaŭzitaĵojn de la revu-eldonado. Bent Holm Laursen el Århus proponis ke oni sendu EeD per retroŝto al tiuj kiuj pretas rezigni pri papera versio; Stanisław Mielczarek proponis ke oni jam en la venonta numero petu tiajn rezignojn, dum Peter Weide ŝatus ricevadi kaj paperan, kaj retan version. Grethe Nielsen el Næstved proponis sendi la paperan version per “ekonomia” poŝto (B-post). Torben Svendsen atentigis ke t.n. pdf-versio de EeD jam nun estas legebla en la retloko esperanto.dk, kaj Jens S. Larsen proponis ke aperu anonco en la dissendolisto esperantodk ĉiufoje kiam nova numero estas surretigita. – Grethe Nielsen proponis ankaŭ ke oni fordonacu librojn kiujn la Libro servo ne povas vendi; montriĝis ke tion la Libro servo jam faris unufoje, sed la prezo por sendi la librojn estis pluraj centoj da kronoj.

Diskutite, la kalkulaĵoj estis aprobitaj.

5. La prezidantino prezentis la laborplanon de DEA 2004-2005 (vidu EeD 2004-1, p. 6). Pri informado: Ĝis nun okazis neniu dissendo de artikoloj pri Esperanto al la amaskomunikiloj, kaj nur la aranĝoj en Næstved estas regule priparolataj en la loka gazetararo. Flugfolioj estas produktitaj. Ankaŭ ne estis tempo okazigi la planitajn prelegojn en lernejoj, kvankam precipe en RUC tio estus utila. Oni planas surretigi la revuon Esperanto-nyt apud la reta versio de EeD kaj laborigi apartan grupon pri informado. – Pri instruado: La kursoj ĉe Lars Kromann, venontfoje kunlabore kun Sunda Esperanto-Agado, jam fariĝis ĉiujara evento. Ankoraŭ ne ekzistas

reta kurso, sed Libroservo akiris ekzemplerojn de la KD-roma kurso eldonita de Flandra Esperanto-Ligo. Malgranda lernolibro (“ŝlosilo”) estas eldonita per financa apogo de la fonduso Tips og Lotto. Oni esperas sammaniere financi la danan-Esperantan vortaron ellaborotan de Eliza Kehlet. Studprogramo pri Esperanto jam ekzistas en RUC. – Pri utiligado: La prezidantino demandis ĉu oni sukcesis organizi jarkunvenon kun alloga programo, kaj la ĉeestantoj ridante jesis. Sed ankoraŭ mankas fari la lokajn kunvenojn pli allogaj kaj akiri pli grandan membraron, eĉ se la junularo reaktiviĝis en DEJO.

Torben Svendsen atentigis ke oni memoru helpi la junulojn, kiuj estas po kvar homoj el Jutlando kaj Selando. – E. Henning Olsen el Næstved raportis ke la regiona televido TV2Øst venos al la klubejo de NEU venontan semajnon, pro la gazetara informado. – La prezidantino raportis pri plano informi en la librofoiro en la Forum-halo en Kopenhago venontan oktobron, inspirite de sukcesa simila agado en Litovio, sed la kostojn Peter Weide trovis malebligaj, kvankam Bent Jensenius sugestis kunlabori kun alia eldonisto. – La kunvena gvidanto finis la punkton per kelkaj meditoj pri la utilo de eksterlandaj prelegantoj.

6. La statutŝanĝan proponon, senditan de la estraro de Næstved Esperanto Unuiĝo, prezentis E. Henning Olsen. Li trovis la pasintjaran jarkunvenon iom ĥaosa kaj esprimis timon ke povus esti malfacile kontroli ĉu ĉiuj voĉdonantoj kaj voĉdon-rajtigintoj efektive estas membroj. Lis Thune el Hvidovre, spertinte kontrolon pasintjare, opiniis ke tio bone funkcias. Karen Olsen el Næstved demandis kiom da voĉdonrajtintoj ĉeestas, kaj la kasistino respondis ke tri ĉeestantoj ne estas voĉdonrajtaj. Torben Svendsen atentigis ke la disputoj de la pasintjara jarkunveno neniel temis pri la voĉdonrajtigiloj. – Oni voĉdonis pri la propono per manlevo, kaj ĝi estis akceptita per 23 voĉoj por, 4 kontraŭ kaj 3 sindetenoj.
7. Kiel prezidanto estis aplaŭde reelektita Ileana Schrøder.
8. Kiel du novajn estraranojn, por anstataŭi Bent Wiinberg kaj Ole Blaust, la prezidantino proponis Ejnar Hjorth el Ålborg kaj Peter Weide el Melby, kaj Bent Wiinberg proponis Jens S. Larsen.

Okazis do skriba baloto; la balotilojn disdonis kaj kalkulis du ĉeestantaj nemembroj de DEA, Ann-Louise Åkerström el Helsingborg kaj Henryka Mielczarek el Århus. Elektitaj estis Peter Weide kun 29 voĉoj kaj Ejnar Hjorth kun 24 voĉoj; Jens S. Larsen kun 14 voĉoj ne estis elektita.

9. Kiel anstataŭantoj estis reelektitaj Ana Røssum kaj Bent Jensenius.
10. Kiel revizoro Jacob Nordfalk el Valby (ekfunkciinta kiel revizoro pro rezigno de Arne Casper) akceptis daŭrigi. Lis Thune ne akceptis novan periodon, dum Aleksander Kogan el Kopenhago antaŭ la jarkunveno informis ke li pretas transpreni; kiel dua revizoro Kogan do estis elektita. Bent Wiinberg akceptis la funkcion de revizora anstataŭanto. La prezidantino kaj Bent Wiinberg reciproke dankis pro lia finiĝinta kunlaboro en la estraro.
11. La Ĝenerala Kunveno en 2005 laŭplane okazos la 9-10 de aprilo en Thune Landboskole, agrikultura lernejo 6 kilometrojn sudoriente de Roskilde. Byrial Jensen esprimis kontenton ke la ĝeneralaj kunvenoj nun okazas samloke kun la tranoktado. Peter Weide sugestis ke oni havu pli festan festmanĝon, kaj Lis Thune proponis ke tiam oni faru aparte mendeblan bankedon kaj enlasu la ceterajn kongresanojn al la posta festo. – Por 2006 estas propono de Malmö fari tie komunan kongreson kun jarkunvenoj de DEA kaj Sveda Esperanto-Federacio.
12. Sub la punkto eventualaĵoj Bent Holm-Laursen rakontis pri ESPERTEL. Momente ACN ofertas servojn nur por fiksita telefono, sed planas vastiĝi al poŝtelefonado, interretaj konektoj, kaj eĉ elektro kaj gaso. Torben Svendsen rakontis ke li komence estis skeptika pri la ideo, sed nun trovas ĝin aprobinda, ankaŭ ĉar estas facile eliĝi. – Poul Kry Poulsen el Ringsted demandis ĉu danoj partoprenos en la manifestacio en Strasburgo, sed ŝajnis ke ne.

La prelegoj en la jarkunveno

Lingvopolitiko

Dum la jarkunvena sabato okazis tri prelegoj. La unua estis de profesoro Robert Philipson, kiu parolis en senmakula dana lingvo pri “Lingvopolitiko: kiaj utopioj estas realismaj?”. La prelego estas bona suplemento al lia libro (vidu la dorspaĝon de ĉi tiu revuo!), kiu estis unuafoje aĉetebla en ĉi tiu jarkunveno kaj en la “malferma tago” de UEA en Roterdamo.

Kvankam la temaro estas kompleksa kaj tikla, la prelegon Philipson liveris en senstreĉa kaj dialoga formo. Eble lia plej citinda diro estis ke la plej grava lingvo de la mondo estas ne la angla, sed la lingvo de povo.

Neŭtraleco kaj internaciismo

La dua prelego, “La du konceptoj de Ivo Lapenna: Aktiva Neŭtraleco kaj Humaneca Internaciismo”, estis prezentita de Birthe Lapenna.

Oni apenaŭ povas eklegi paĝon verkitan de Ivo Lapenna, ne trovante ion citindan. Jen

ekzemple pri neŭtraleco: “Estus malsaĝe pretendi kaj oni tial ne pretendis, ke la esperantistoj fariĝu neŭtralaj, sed oni prave pretendis, ke niaj societoj estu tiaj. Ne do societoj de neŭtralaj esperantistoj, sed neŭtralaj societoj de esperantistoj.”

La prelego plejparte konsistis el voĉlegado de tiaj citaĵoj – en ne tre atentokapta formo, bedaŭrinde.

Interpretado

La plej dialoga kaj malstreĉa prelego – do ĝuste metita kiel la lasta! – estis tiu de Eliza Kehlet, kiu parolis pri siaj spertoj kiel interpretistino ĉe EU en Bruselo.

Kvankam estis pli ĝuste interbabilo ol prelego, ĝi estis plena de interesaj detaloj. Unu detalo eble iom neatendita estas ke plej malfacile estas interpreti homon kiu nur voĉlegas manuskripton. Tiel estas ĉar en tiu situacio oni parolas tro rapide kaj, tro atentante la tekston, ne sufiĉe atentante la aŭskultantaron.

JSL

El mia esperantista vivo

Bodil Kühlmann konsentis iom rakonti pri travivaĵoj el mia esperantista vivo:

Dum 63 jaroj ja multe okazis, sed mi provas. Mi sincere diras al vi, ke estas iom malfacile, ĉar antaŭe mia edzo estis malantaŭ mi, kaj ni ĉiam kune laboris.

La komenco

Mi devenas de Fredericia kaj en 1937 kiel 16-jara junulino mi partoprenis Esperantokurson Cseh-metodan – la instruisto estis germano, ni estis 20 junaj kaj nejunaj en la kurso. Ĝi bone funkciis, la instruisto estis vigla kaj lerta, kaj ni bone lernis.

En la daŭro de la vintro ni estis invititaj al kluba kunveno por aŭskulti prelegon de nederlanda sinjorino. Ŝi estis sperta esperantistino – tre rapide parolis – poste ni novuloj interkonsentis, ke la sola vorto, kiun ni kaptis estis la vorto kaj. Tamen ni progresis kaj aliĝis al la klubo. La prezidanto S.K. Nielsen estis tre aktiva kaj komprenis aktivigi la membrojn.

Malfacilaj jaroj

Venis la okupado de la lando, sed la laboro por Esperanto plu-daŭris, kvankam ne tiel brue al la

ekstero. Ekzemple la jarkunveno (tiam ne kongreso) de la landa asocio estis nuligita en 1940, sed ekde 1941 denove okazis jarkunvenoj, en Århus, en Odense, en Viborg, Fredericia kaj tiel plu, feliĉe ankoraŭ hodiaŭ funkcias la jarkongresoj.

En miaj fruaj jaroj la jarkunvenoj okazis dum la pentekostaj tagoj, kaj ni havis bonan tempon interamikiĝi ekster la kunvenoj. La partoprenado en la jarkunvenoj nombris plej ofte pli ol cent personojn.

Ĉiu pagis sian kotizon – ankaŭ la ĉefestraranoj. Ili eĉ dividis inter si la vojaĝkostojn al la ĉefestraraj kunvenoj. La diversaj ĉefestraroj dum la jaroj vere multe laboris, ekhavis novajn ideojn, kaj ili plenumis la ideojn.

La prezidanto tiam estis doktoro Justesen. Dum pluraj jaroj li vivis eksterlande, tiam revenis al Danlando – feliĉe por la dana movado, ĉar doktoro Justesen malfermis sian monujon, kaj tiel savis la movadon de bankroto.

En 1943 li retiriĝis kiel prezidanto. Kiel danko por lia granda laboro, oni en la jarkunveno en Viborg nomumis lin Honora Membro de nia asocio.

S-ro O.C. Lange postsekvis lin – eĉ dum du periodoj, aliaj sekvis,

ekzemple Svend Dragsted kaj Ib Schleicher. KEK povas iom fieri, ĉar la tri nomitaj sinjoroj estis kaj estas membroj de KEK.

S-ro L. Friis el Åbyhøj dum pli ol 25 jaroj gvidis Somerajn Kursojn – ankaŭ dum la okupado. Du-semajna kurso en la internacia altlernejo en Helsingør kun enlandaj kaj eksterlandaj gastoj. Kursoj diversnivelaĵoj antaŭtagmeze – posttagmeze libera restado kaj kelkfoje ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo kaj vespere diversaj aranĝoj.

Dum la okupado – pro malfacilaj vojaĝeblecoj – okazis kursoj kaj en Selando kaj Jutlando kun kontentiga partoprennombro. S-ro Friis estis eminenta gvidanto de tiu flanko de la Esperanta laboro.

En 1942 mi gvidis kurson por komencantoj, kaj nia prezidanto instigis min somere 1943 partopreni la someran seminarian kurson de Friis en Silkeborg – kompreneble por pliperfektigi en la lingvo, tiel ke venontvintre mi gvidu kurson por daŭrigantoj.

Mi cerbumis – fine decidis iri tien. Kvankam ni vivis en malfacila tempo, 48 esperantistoj el Selando, Fueno kaj Jutlando kolektiĝis en plej brila somera vetero, kaj ĝi daŭris dum la tuta semajno. Friis aranĝis tie por du semajnoj, oni povis aliĝi aŭ por unua semajno, aŭ la dua, eĉ por ambaŭ semajnoj. Mi do aliĝis al la

unua semajno – mi havis nur unu semajnon da ferio.

Tie mi renkontis kopenaganon, ni interamikiĝis, semajnon poste ni gefianciĝis, jaron poste en julio ni geedziĝis, kaj mi translokiĝis al Kopenhago.

Iom bedaŭre mi forlasis la klubon en Fredericia kaj miajn multajn geamikojn en la Klubo.

Antaŭ ol mi forlasis la urbon mi esperantigis mian fraton kaj bofratinon, ili restis fidelaj membroj de la klubo, ĝis la klubo fermiĝis, kaj ili ankoraŭ hodiaŭ kunvenas kun geamikoj esperantistaj en Fredericia.

Montriĝis, ke mia edzo jam komence de 1944 membrigis min en KEK, kaj mi konstatis, ke mia esperanta agado ne finiĝis, ĉar ankaŭ KEK estis laborema kaj vigla klubo.

Post la milito

Finiĝis la milito, la esperantistoj sopiris vojaĝi, renkonti malnovajn geamikojn kaj saluti novajn. Al nia lando venis rifuĝintoj el Polujo, Bohemujo, Ĉeĥoslovakio kaj baltaj landoj.

Ili instaliĝis en lernejo kaj KEK kontaktis la ruĝan krucon, kaj sukcesis havi permeson instrui Esperanton tie. Ni aranĝis kunvenon kaj sufiĉe multaj aliĝis al la kurso, kiun mi instruis ĉiutage 4 horojn dum 3 semajnoj, kaj ili sukcesis paroli en

Esperanto ĉe aranĝo en proksima gastejo.

Ili poste reiris al siaj hejmaj lokoj. Duonan jaron poste en unu tago venis unu el ili kun sia edzino al nia hejmo por saluti min en Esperanto, ili feris en Danlando. Mi povis konstati nevanan laboron por Esperanto.

En 1947 okazis la SAT-kongreso en Århus kaj ŝajne multaj el la partoprenantoj ŝatis viziti Kopenhagon, ĉar nia gastlibro de tiu periodo montras, ke multaj en- kaj eliris nian loĝejon. Trifoje dum unu semajno mi kun mia unu-jara filino surbrake vizitis la Rondan Turon ĝis la supro kune kun esperantistoj. Eble vi demandas: Kial la Ronda Turo? Ĉar la eniro estis senpaga. La gastoj ne havis multan monon, kaj same ni ne.

La aktiveco en KEK estis granda, kvar kursoj ĉiusemajne kun bona partopren-nombro. La kursoj okazis sub la vesperlerneja leĝo, kaj la membronombro en KEK en certa tempo estis pli ol 200.

Kongresoj

En 1953 okazis en Kopenhago komuna jarkongreso inter nia landa asocio kaj la laborista asocio. Ĝi estis granda aranĝo, ĝi okazis en la dana parlamento kun gastoj el Svedio. La protektanto por la jarkongreso estis la ĉefurbestro H.P. Sørensen.

Denove en 1983 estis komuna jarkongreso, ĉi-foje aliĝis ankaŭ DEFA kiel kunlaboranto.

En 1948 La Universala Kongreso devis okazi en Malmø. La danoj ja tre ŝatis partopreni, sed valuto ne estis tiel facile havebla, oni devis peti ĉe la Nacia banko. Tamen 100 personoj povis partopreni helpe de niaj svedaj geamikoj. Por la unua fojo multaj danoj ĝuis semajnon de internacia etoso.

Sed kongreso en Malmø! Kiel pri postkongreso? Kompreneble en Kopenhago. Ni komencis labori, kaj rezultis tri tagoj kune kun 600 partoprenantoj kaj kun bonvenigo de la ĉefurbestro en la urbodoma halo. La akceptejo estis en Politikens Hus, ekskurso al norda Selando – 10 aŭtobusoj, plenaj de gajaj postkongresanoj, multaj aliaj aranĝoj okazis – kaj fine ĝis revido al niaj gastoj post sukcesa aranĝo.

Aldone mi povas rakonti, ke ĉeestis la postkongreson la nepo de d-ro Zamenhof, Ludoviko Zaleski Zamenhof. Per helpo de svedo (sufiĉe altranga) li sukcesis veni. Lia pasporto restis en Svedio, oni donis al li papereton, tiel ke li povis enveni Danlandon kaj reveni al Svedio. Tio por ni estis bona propagando. Li ja tiam loĝis en Polujo, sed nun li loĝas en Francio, kaj havas rilaton al la

Esperanto-Movado. Eble iu el vi renkontis lin en iu Kongreso.

Vizitoj

Nun la esperantistoj vojaĝis, karavan-aranĝoj al la sudo, al la nordo, kaj al kongresoj. El tio rezultis oftaj vizitoj en nia hejmo, interparoloj tre interesaj, kelkfoje ĝis malfrue en la nokto.

Vizitis nin japano, ni invitis al lunĉo. Mi aranĝis la tablon, diris bonvolu sidiĝi. Tiam la japano demandis mian edzon, ĉu li atendas trian gaston, ne, diris mia edzo, sed estas tri teleroj sur la tablo, diris la japano, jes estis la respondo, la tria kompreneble estas por mia edzino, sed ĉu ŝi ne manĝas en la kuirejo, ne, respondis mia edzo, tiel oni ne traktas la virinojn en Danlando. Ni ĉiuj tri sidiĝis.

Finna esperantisto Vilho Sätälä, tre konata esperantisto tiam, pruntis mian biciklon kaj ĉirkaŭiris Selandon per ĝi.

Juna persono el Persujo trovis nian adreson, en nia gastlibro li ĝoje konstatas, ke mi komprenas, kion vi diras al mi en Esperanto. Sukceso, ĉu ne.

Kvin gefrancoj partoprenis la kurson de Friis en Helsingør. Membro de KEK invitis ilin al Kopenhago, sekve mi gastigis ilin por vespermanĝo. Unu el ili ankoraŭ hodiaŭ estas nia bona amiko, ni estas en telefona

kontakto sufiĉe ofte, momente li bedaŭrinde ne tre bone fartas.

Ni partoprenis la kongreson en Hungario. Usonano, dane edziĝinta, petis nin kunpreni en la trajno al Kopenhago, geedzan paron el Argentinio. La usonano havis kontakton kun dano, kiu akceptu la geedzan paron ĉe alveno en Kopenhago. Sed alveninte la dano ne aperis, ni atendis horon, neniu aperis, kaj fine mia edzo diris al mi, la manĝo povas esti nur solvebla en unu maniero, kaj tiel estis, la geedza paro eniris nian domon kune kun ni, kaj loĝis ĉe ni dum unu semajno, kaj la dano ne aperis.

Ni kompreneble prizorgis la paron, sed tiel oni ne traktu gastojn, kiu opiniis, ke ĉio estis jam bone aranĝita. Fakte la usonano kaj lia edzino kontaktis nin, kaj postan tagon ili venis, kaj prenis la paron al ekskurso en la urbo. La usonana paro venis fluge al Kopenhago.

UK-oj en Kopenhago

Unu jaro pasas post la alia, kaj flanke de UEA, oni demandis, ĉu Kopenhago ne ŝatus inviti Universalan Kongreson.

Post leteroj, demandoj, ekonomio kaj tiel plu, okazis do la Universala Kongreso en Kopenhago en la jaro 1956. Ĝi estis unu el la kulminoj de nia Esperanta laboro, kaj denove en 1975 ni

havis Universalan kongreson. Ambaŭ kongresoj donis profiton al KEK, sed ili preskaŭ forprenis ĉiujn niajn fortojn, vi devas pripensi, ke ni daŭre havis nian ĉiutagan laboron.

Sur la loka tereno ni dum multaj jaroj aranĝis la Dan-svedajn Tagojn, alterne en Danlando kaj Svedio. Ili ĉiam okazis la unuan dimanĉon en septembro, kaj ni ofte estis akceptitaj en la urbodomo de la koncerna urbo. Propagandcele La tagoj bone efikis.

Tiom longe, kiom ekzistis la Komunkomitato de Kopenhagaj Esperantistoj, LEK, KEK, kaj DEFA aranĝis prelegojn de eksterlandanoj – kaj ankaŭ aliajn pli grandajn aranĝojn. Tiu laboro okazis en tre bona harmonio.

Esperantistetoj...

Ni ja ankaŭ kelkfoje prizorgis nian privatan vivon. Nia filino Lizeta kreskis, edukiĝis, kaj pro la multaj esperantistoj, kiujn ŝi renkontis, ŝi bone komprenis kaj parolas esperanton. Ŝi fariĝis membro de KEK en 1963 kaj daŭre estas membro. Kelkfoje ŝi partoprenis la kongresojn kune kun ni.

Kiam ŝi estis 10-jara ŝi partoprenis la unuan infanan kongreseton en 1956, ĝi havis lokon en Hellerup, kaj de tiam restas bona amikeco inter Peter Weide, Eliza Kehlet kaj ŝi. Ŝi dum

multaj jaroj laboras eksterlande, tamen ŝi pere de mi kompreneble sekvas nian movadon.

... kaj esperantistegoj

Se vi rigardas nian kantlibron Kantante antaŭen, vi trovas nomojn, de tiuj, kiuj aŭ verkis kantojn aŭ tradukis ilin. Mi bone scias, ke la nomoj diras al vi nenion, sed por ni, kiuj konis ilin, kiel veraj esperantistoj, ni nur povas iom admiri ilin, ili ja ankaŭ uzis sian libertempon, favore al nia lingvo.

D-ron Justesen vi trovas sufiĉe ofte. H.E. Jensen aŭ H.E.J. estas la sama persono. Li loĝis en vilaĝo en Jutlando, kaj tial plej ofte ni nomis lin Jensen, Toustrup. En la severaj vintroj en la 40-dekaj jaroj, li ne rifuzis bicikli al najbaraj urboj por instrui Esperanton.

C. Graversen el Esbjerg estis la afergvidanto de nia asocio, hodiaŭ ni ja diras kasisto.

Chr. Hougård iama prezidanto de la asocio kaj ĉefdelegito de UEA.

S.K. Nielsen, la aktiva prezidanto de la klubo en Fredericia.

E. Windeballe, dum pluraj jaroj redaktoro de nia gazeto, ĉiam preta pri kanto por iu festo, li faris melodiojn al pluraj kantoj en nia kantlibro.

Du junuloj Viktor Holm kaj Hans Honoré kontribuis per

verkado de kantoj kaj melodioj. Viktor Holm tragike mortis en 1943 nur 23-jara. Li vere regis la lingvon.

Vi eble nun komprenas, ke multaj en tiu tempo laboris por antaŭenigi la danan movadon en plej diversaj manieroj. La nomoj cititaj estas personoj, kiujn mi tre bone konis, kaj kelkajn el ili mi vere estimis. La du junuloj kaj mi estis samaĝaj, kaj ni kune amuziĝis kun aliaj gejunuloj – en kaj ekster la kluba vivo.

Agadoj

Mia edzo – Gustav Kühlmann – kaj mi partoprenis 39 UK-ojn kaj tiel kompreneble renkontis multajn esperantistojn – kelkaj konataj en la movado, kelkaj, ĉu mi diru ordinaraĵoj esperantistoj, sed ĉiuj tre agrablaj.

En 1944 mia edzo fariĝis prezidanto de KEK, li estis ĉefestrarano, dum sep jaroj gvidis la Libro-servon, komitatano de UEA.

Mi preferis labori malantaŭ la kulisoj, tamen mi redaktis dum sep jaroj nian tiaman Dansk Esperanto-Blad. Mi gvidis kurson por blinduloj, poste voĉlegis blindulan gazeton sur bendo. Dum kelkaj jaroj mi estis prezidantino por la Komunkomitato. Mia edzo estis deligito por UEA kaj mi sekretarino por la Veterana klubo sub UEA.

Esperantistino foje diris al mi: Vi travivis tiom, ke ne restas pli por vi, tamen mi ja ankoraŭ vivas. Mia vivo estis plena de Esperanta agado, kaj mi tion ne ŝatus malhavi.

Nekrologoj

Maria Henriksen (1931-2004)

Maria Henriksen mortis 74-jaraĝa la 4-an de julio 2004. Ŝi naskiĝis en 1931 en Pollando. Maria venis al Danio pro la edzo Kaj Henriksen, kiun ŝi renkontis ĉe Esperanto-aranĝo.

Maria havis plurajn hobiajn/interesojn: la familion, Esperanton, poemverkadon, instrui korektajn laborpoziciojn, ekzercojn de laŭcela ridado, Martinus-kosmologion kaj Budhanismon. Maria estis periode malsana dum la lastaj jaroj. Ŝi preparis la entombigan aranĝon kunlabore kun budhanoj.

Plurajn UK-ojn ŝi vizitis. La lokajn klubojn ŝi diligente vizitis. Ŝi postlasas filinon Brigitta kun la filo Felix – kaj filon Kim kun Villads. Ke Maria ripozu pace!

Jytte Sunekær

Nicolai Liventhal (1916-2004)



Nicolai Liventhal naskiĝis en 1916 en Tallinn, Estonio. Li studis ekonomion en la Univeritato de Tartu (1938-1941), poste ankaŭ diversajn lingvojn en la sama universitato.

Fuĝinte en la ĉefurbon kaj agente dum kelkaj monatoj en la arbaroj somere de 1941, li revenis al Tallinn dum la germana okupacio. En 1943 li edziĝis al sia tiam lernantino de Danio kaj translokiĝis tien. Poste ili divorcis. En 1975 li edziĝis al la danino Grethe Liventhal.

De 1968-1987 li estis ŝtatoficisto en la dana Ministerio de Defendo.

Liventhal memstare ekstudis Esperanton komence de 1934 en la gimnazio. La saman jaron li partoprenis la UK en Stokholmo. Li estis estrarano de Esperanto-Asocio de Estonio (1938-1940) kaj kunlaboris kun la fratinoj Helmi kaj Hilda Dresen.

Nicolai Liventhal verkis kelkajn artikolojn kaj aperigis du librojn: en 1936 la satirajn poemojn

“Esperantio – ĉefe en Danio”, kaj en 1994 la libron “Kriptologio kaj Spionado” en la estona.

Post la milito li daŭrigis sian Esperanto-aktivecon en Danio, kie li gvidis Cseh-kursojn. Dum multaj jaroj en Kopenhago li estis membro de la monde konata Kleriga Konversacia Klubo / Studenta Esperanto-Klubo (KKK/-SEK), kies prezidanto estis s ino Kirsten Zacho, kiu i.a. dum kelkaj jaroj estis redaktoro de la revuo “Esperanto”.

Ekde 1974 Liventhal sekvis kaj plene apogis la internaciajn grupojn (iniciatitajn de Peter Zacho el Danio kaj de Jean Thierry el Francio), kiuj tuj kunfandiĝis en Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM) – daŭrigo de la Zamenhofa linio. Ekde 1976 ĝis 1987 li ĉeestis la Konferencojn de NEM, organizitajn de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM). Li estis abonanto de ĝia organo, la kultura kaj informa revuo “Horizonto”. Kiel humanisto Nicolai Liventhal plene subtenis la idearon de Prof. D-ro Ivo Lapenna.

Birthe Lapenna

Loke

Kopenhago

La kluboj KEK kaj DEFA-Kopenhago kunvenas en Banestyrelsen, Vasbygade 10, ĉiun lundon ekde 19.30 h. Kontaktuloj: KEK ĉe Jytte Sunekær, ☎ 4448 4726 – DEFA ĉe Astrid Birkbak, ☎ 4497 4329.

La du kluboj havas komunan interretan adreson:

✉ defakek@hotmail.com

Unufoje monate, je la 19a horo, okazas prelego en la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) en publika kunvenejo de la biblioteko ĉe Danasvej 30B, dua etaĝo. Detaloj haveblas ĉe Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 2720 Vanløse, ☎ 3874 9764. Interrete:

✉ kulturgrupo@webspeed.dk

Kursoj kaj studgrupoj

Por daŭrigantoj Arne Casper aranĝas legogrupon (temo: La fabeloj de H.C.Andersen) ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 de 13/9 ĝis 6/12.

Studgrupo funkcias ĉiun duan lundon ekde 13/9; ni daŭrigos la laboron pri la libro de Kolker: ‘Vojaĝo en Esperanto-lando’ – voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado, lingvaj interesaĵoj... se estas intereso, grupeto povos daŭrigi ankaŭ la laboron pri fabeloj de H.C. Andersen, komencitan pasintvintre. Gvidantoj Bent kaj Lene.

La prezo por partopreni kurson, legogrupon aŭ studgrupon estas 250,00 DKK, se oni ne estas membro en unu el la du kluboj (KEK aŭ DEFA). Se oni estas membro, la partopreno esta senkosta. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen kaj Arne Casper.

Membrecaj jubileoj en KEK

Bodil Kühlmann, 60 jaroj Erik Mortensen, 50 jaroj*

Bjarke Nielsen, 50 jaroj Lizeta Kühlmann, 40 jaroj*

Tage Sørensen, 30 jaroj Jens S. Larsen, 10 jaroj

Svend Lindstrøm, 10 jaroj Hanne Thrane, 10 jaroj

*(jam en 2003)

Programo de la kopenhagaj kluboj

(KEK/DEFA kie ne estas indikita KEKG).

- 30 aŭg Informoj pri la vintra sezono – kaj diversaj enigmoj
- 6 sep Post la 6a Eŭrop-Unia Kongreso en Bilbao – partoprenintoj rakontos.
- 8 sep *KEKG* Prelego de Bent Jensenius: “Vojaĝo en tempo kaj spaco”. Rakontoj kun lumbildoj el la landoj Kolombio, Brazilo kaj Paragvajo de la 1970-aj jaroj.
- 13 sep La studsezono komenciĝas jam! Nia oferto ĉi-aŭtune – ĝis Novjaro: Komencantojn instruas Bent Jensenius ĉiulunde 17.45-18.30 kaj 18.45-19.30 de 13/9 ĝis 6/12
- 20 sep Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi.
- 27 sep Kursoj kaj studgrupoj.
- 4 okt Bent Wiinberg ludigos nin.
- 11 okt Partoprenintoj rakontos informoj pri la 56a Internacia Fervojistista Kongreso en Sopron, Hungario.
- 14 okt *KEKG* Prelego de Jens S. Larsen: “Lingvistikaj revolucioj”. Malkiel ekzemple la fizikaj sciencoj, la lingvoscienco dum la lastaj du jarcentoj trairis unu ĉiodetruan revolucion post la alia. La ĝustaj respondoj, kiuj faras el lingvistiko stabile progresantan sciencon, klariĝis nur dum la lastaj dek jaroj, kaj ili ankoraŭ estas tre malmulte konataj.
- 18 okt Kursoj kaj studgrupoj.
- 25 okt Kursoj kaj studgrupoj.
- 1 nov La krepuska sezono: pri nordia literaturo.
- 11 nov *KEKG* Prelego de Aleksander Kogan: “Ekbruligis mi fajron en kor’: Pri la rusa blindula poeto kaj esperantisto Vasilij Eroŝenko”.
- 25 nov *KEKG* Mogens Rude Andersen : “1954 – 10.12 – 2004: La 50-jara datreveno de la Montevidea Rezolucio favore al Esperanto. Parto I (1946-1953)”. Pri la historion malantaŭ la rekono de la Internacia Lingvo fare de UNESKO. Parto II (1953-1954) sekvos en januaro 2005.
- 11 dec Zamenhof-festo ĉe la pola ambasadejo. Detala programo de la vespero aperos aŭtune.

Jytte Sunekær / Lene Niemann / Torben Svendsen

Århus

Prezidanto (iom ankoraŭ): Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J. ☎ 📠 8629 2306 ✉ stanis@ofir.dk (NB: nova retadreso!).

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: je la 19.30 h.

Okazis:

29.01: Tiun vesperon vizitis nian klubon Ileana Schrøder, la nova prezidantino de Dana Esperanto-Asocio. Ni spertis, ke la prezidantino estas tre energia kaj sufiĉe optimisma koncerne la Esperantomovadon en Danio. Ŝi prezentis siajn ideojn rilate al la estonto de la dana Esperanto-movado. La prezidantino informis nin ankaŭ pri Esperanto-kurso en Roskilde Universitetscenter.

La ekonomia situacio de Dana Esperanto-Asocio bedaŭrinde ne estas tro bona. Estas dezirinde, ke ni ekhavu pli da membroj. Tamen ni ĉiuj konstatas, ke estas tre malfacile “kapti” novajn adeptojn de Esperanto en la moderna mondo plena de amaskomunikiloj ktp.

Inter 13 klubanoj, kiuj ĉeestis la kunvenon estis ankaŭ Bent Holm Laursen, kiu reklamis la “senpagan telefonabonon”, kiu povus doni flankan profiton al Dana Esperanto-Asocio.

26.02: Okazis ĝenerala kunveno. Bedaŭrinde en la jaro 2003 mortis la honora membro de DEA kaj la Århus-a klubo – Jenny Jørgensen, tiel ke la klubo fine de la pasinta jaro havis 31 membrojn.

La nuna estraro konsistas el: Stanisław Mielczarek kiel prezidanto, Grethe Kvist kiel kasistino. Nikoline Fiora kaj Byrial Jensen fariĝis novaj estraranoj. Jørgen Kristoffersen daŭrigas kiel sekretario kaj Wolfgang Kirschstein kiel anstatuanto.

Koregan dankon al la eksestraranoj – Arthur Robinson kaj Henry Simonsen, kiuj ne deziris reelekton. Ni ankaŭ korege dankas al Tove Jyding, kiu dum multaj jaroj funkciis kiel revizoro kaj ne deziris reelekton. Ni reelektis Agnete Kristoffersen kaj novelektis Arthur Robinson kiel revizorojn. Tove Jyding estas revizoranstataŭanto.

25.03: “Ĉu mi mem povas diri: mi parolas Esperanton?”. La demando montriĝis malfacila. La maloftaj kunvenoj en la klubo kaŭzas, ke nia scipovo de Esperanto malboniĝas. Ni devus ekzerci nin multe pli!

Stanisław Mielczarek

5.8: Søren Dalmose, patro de la fratoj kiuj ludis popolmuzikon en nia jarkunveno en Aalborg, estis intervjuita de la radioprogramo “De sprøde heste”, kiun DR P3 dissendis okaze de la muzikfestivalo en Skanderborg. Interalie li estis petita traduki kelkajn frazojn por doni impreson kiel la lingvo sonas. La ĵurnalisto estis petinta ĉe la prezidantino de DEA intervjuon kun esperantisto, sed ŝajne neniu scias kio donis al li tiun ideon.

La kunvenoj de la Esperanto-klubo de Århus okazas ĉiun lastan ĵaŭdon de la monato. La unua post la somera ferio estos la 30an de septembro, kun la temo: “Mia ferio”.

JSL

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, ☎ 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.

La kunvenoj okazas vendrede en Grønnegades kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111, ekde 19.30.

Okazis:

La traduklaboro pri HCA-fabeloj bone progresis dum la vintraj vendredvesperoj. Sed ankaŭ kvar prelegoj bone sukcesis, nome:

30.01. Lene kaj Jan Niemann pri vizito en Florenco kaj Toskanio,

27.02. prezidanto de DEA, Ileana Schrøder, pri estonto de DEA kaj de UEA, 12.03. Liss-Lotte Talbro pri projekto en Litovio kaj 26.03.

Birthe Trærup pri dana pentristo Elias Petersen.

La ĝenerala kunveno 13.02. ne donis ŝanĝojn de la estraro, sed montris raporton pri konstanta agado, ne laste en la informa fako.

La venonta kunvensezono komenciĝos verŝajne la 17an de septembro.

Grete Nielsen

UK en ĉina urbego

Por mi la 89a Universala Kongreso de Esperanto estis tre bona travivaĵo. Mi partoprenis en multaj ekskursoj al temploj, al la fama granda muro ktp., kaj ĉio estis vere tre interesa. La vetero estis tre



La kongresejo en Pekino

varma krom la tago kiam ni vizitis Tien Anmen-placon ĉar tiam pluvis kaj blovis. Tiufoje mi ankaŭ malfeliĉe perdis la kontakton kun la cetera grupo, kaj la buso estis for, kiam mi revenis al la bushaltejo. Mi trovis tuk-tuk-taksion, sed la ŝoforo ne konis la vojon kaj ni veturis dum tre longa tempo antaŭ ol li trovis la hotelon.

En la kongresejo estis multaj kunvenoj pri diversaj temoj. Mi vizitis kelkajn, sed plej interese por mi estis vidi, ke se oni sidis sur benko en la halo, tuj alvenis aliaj kongresanoj kiuj scivoleme demandis de kiu lando oni venas, kiun nomon kaj profesion oni havas ktp. Mi parolis kun multaj kaj ĉinoj kaj aliaj landanoj. Eble ĉiam oni faras tion, sed mi neniam partoprenis kongreson antaŭe, kaj tial mi ne scias.

Mi ĉeestis nacian vesperon kaj internacian artan vesperon. Ili ambaŭ estis bonaj, speciale la ĉinaj artistoj estis mirinde kapablaj, sed ankaŭ la dancoj, tamburistoj kaj aliaj estis ege bonaj.

Mi havas nur malgrandan plendon: en la kongreslibro ne estis skribita la adreso de la kongresejo. Ĝi devus fakte esti skribita kaj en latinaj literoj kaj en ĉinaj ideogramoj, tiel ke oni povus vidigi ĝin al taksi-ŝoforo.

Bjarke Nielsen

Nova estraro de UEA



De maldekstre dekstren: Yu Tao, Claude Nourmont, Ulla Luin, Renato Corsetti, Maritza Gutierrez, Ans Bakker-ten Hagen, Amri Wandel.

La komitato de UEA en Pekino iom draste renovigis la estraron de la asocio.

El sep estraranoj nur du estis en la antaŭa estraro, nome la prezidanto Renato Corsetti kaj estrarano pri financoj Ans Bakker-ten Hagen. La novaj estraranoj fariĝis Ulla Luin (ĝenerala sekretario) el Svedio, Claude Nourmont (vic-prezidanto) el Luksemburgio/Francio, Yu Tao el Ĉinio, Maritza Gutierrez el Kubo kaj Amri Wandel el Israelo.

El kandidatoj por la estraro nur Andrej Grigorjevskij ne sukcesis esti elektita. Alia kandidato el la eksa estraro, ĝenerala sekretario Ivo Osipov

falis jam en la elektoj de komitatanoj B.

Rimarkindas, ke Humprey Tonkin finis sian 30-jaran estraran karieron komencitan en Hamburgo 1974. La pli-multo el estraranoj estas nun virinoj, la unuan fojon en la historio de UEA.

Post la elekto la nova estraro strebis disdoni taskojn ankaŭ al tiuj, kiuj volis proponi sian kiel alternativaj kandidatoj. Jukka Pietiläinen estis nomumita komisiito pri informado, dum mankas tia fakulo en la estraro, kaj Yves Beullefeuille gvidas la subkomitaton pri administrado kaj financoj.

Jukka Pietiläinen en La Ondo de Esperanto

IJK en rusa arbaro



Vojaĝi estas vivi; tiel, en Rusio oni vivas multe, ĉar estas enormo lando! Ĉi-jare ni havis la plezuron malkovri iomete de la plej granda lando en la mondo, okaze de la 60a Internacia Junulara Kongreso, la ĉiujara kongreso de TEJO.

Pro la penego akiri vizojn estis ankoraŭ pli interese. Mi iom timis ke malmultaj sukcesos... sed kiam mi alvenis, mi tuj renkontis amikojn de IJK en Svedio aŭ IS en Germanio, feliĉe! Kaj mi ĝojis vidi homojn veni el multaj mondanguloj, el Francio, Germanio, Italio, Danio, Svedio, Finnlando, Estonio, Pollando, Svislando, Ukrainio kaj plu, per ŝipo, trajno, buso, aviadilo. Eĉ la rusa burokratio ne povis haltigi nin, kvankam multaj havis problemojn.

Antaŭkongreso

Rusaj esperantistoj aranĝis antaŭkongresojn en la plej konataj urboj, Peterburgo kaj

Moskvo. Mi iris al Peterburgo, loĝis en la Esperanto-klubo tie kun tridek aliaj eksterlandanoj. Post tri tagoj ĉiuj konsentis ke Peterburgo estas unu el la plej belaj urboj de la mondo, kun belaj domoj en multaj koloroj, grandaj placoj, kaj akvo ĉie.

Ĉefkongreso

Iri al IJK ankoraŭ estis travivaĵo. Ni trajnis nokte en unuĉambra granda vagono plena de esperantistoj kaj rusoj. Matene ni alvenis al apud Kovrov, malgranda urbo nordoriente de Moskvo kun cent kvindek mil loĝantoj. Ni loĝis dudek kilometrojn de Kovrov en eksa feria centro por la junularo komunista; hodiaŭ ĝi estas malfermita por ĉiu kiu povas pagi.

Estis vere komforta loko kun grandegaj kunvenejoj kaj manĝejoj, naĝejoj, saŭno kaj bela arbaro kun amaso da beroj. La loko estis granda ĉar estis centra domo kun manĝejoj, kunvenejoj ktp., kaj estis tendaro en la arbaro kaj ankaŭ estis urbeto en la arbaro kun amasloĝejoj en dometoj. Trans

la arbaro estis rivero kaj bela pejzaĝo. Kuloj kaj strangaj insektoj abundis. Ankaŭ gardistoj profesiaj estis, ĉar en Rusio sekureco ne facilas.

La kongresprogramo estis interesa, plejparto estis bona por renkonti homojn. Oni povis diskuti pri Esperanta movado, lerni rusajn dancojn, prepari teatron, promeni en la arbaro, fari te-ceremonion, ekskursi k.c.. Oni neniam estis sola kaj la tempo rapide pasis...



En Moskvo mi renkontis ankaŭ Lenin – aŭ iun kiu ege similas.

Postkongresoj

Eliri de Rusio estis ankoraŭ pli longa vojaĝo ol eniri. Estis oficialaj postkongresoj oriente de Kovrov, sed ankaŭ multaj homoj kiuj estis en antaŭ-kongreso en Peterburgo volis viziti Moskvon kaj inverse. Tiel unu ondo da esperantistoj trairis okcidenten, unua haltante en Moskvo, poste en Peterburgo.

Mi unue iris al la oficiala postkongreso en Ĉeboksari, ĉefurbo de etna regiono en Rusio kaj centro de rusa esperantista movado. Ĝi estas bela urbo apud Volgo, tamen mi ne restadis longe, sed iris kun amikoj rekte al Moskvo por kuniĝi kun la ondo! Tie ni faris post-post-kongreson neoficialan, kaj vidis kun rusaj amikoj multon de la urbo. La Esperanto-centro en Moskvo estas tre ĉarma, ili tutkore bonvenigis dudek homojn kiuj spontane alvenis kaj postulis nur tri eŭrojn por tranoktado.

Poste la ondo pluiris okcidenten al Peterburgo por fari post-post-post-kongreson tie. Ĉi-foje mi vidis matenkrepuskon sur tegmento en la urbo, ege belan – tio eblis nur dank'al rusaj amikoj!

Preskaŭ tri semajnoj forpasis kaj homoj satiĝis de aventuroj, estis tempo iri hejmen. Mi iris per buso al Finnlando (kaj devis montri pasporton sesfoje por eniri!) kaj ŝipis el Turku al Stokholmo inter la belaj insuloj. Finfine mi trajnis al Kopenhago sata kaj kontenta, mi ankoraŭ digestas!

Rasmus Høyrup Jensen, prez. de Dana Esperanto-Junulara Organizo

Pri la manifestacio Eŭropa Bunto 2004

La 9-a de majo 2004 estis tre pozitiva tago pri pluraj aferoj. Malgraŭ la distanco kaj la malbona vetero, pli ol 300 homoj kunamasiĝis en Strasburgo. La manifestaciintoj estis venintaj el ĉiuj partoj de Francio sed ankaŭ pluraj alvenis el Germanio, el Belgio, el Svislando, el Britio kaj eĉ el Serbio.

Ekde la 10-a horo, la partoprenantoj amasiĝis sur la Placo de la Universitato. La rendevua loko estis facile videbla dank'al la bunta balonego, kiu superis la Placon de l'Universitato kun banderolo EŬROPA BUNTO alkröcita laŭ la balonega ŝnuro.



Post kelkaj bonvenigaj vortoj de Denis-Serge Clopeau, pluraj partoprenantoj salutis la publikon en sia gepatra lingvo. Koncerto de Jomo estis tre ŝatita de ĉiuj: liaj kantoj en diversaj lingvoj donis iun certan etoson al la aranĝo kaj tiklis la atenton de la ĉirkaŭa strasburga publiko.

La manifestacio ekis kun malfrueto ĉirkaŭ la 14-a kaj duono. La kunirantaro en la aleo de la Robertsau estis sufiĉe impona pro ties longeco kaj multeco da banderoloj. La pluvo, kiu ekfalis ekde la duono de la marŝado, tamen ne senkuraĝigis la partoprenantojn, kiuj iris ĝis antaŭ la Europa Parlamento. Tie, sub sufiĉe forta pluvo, oni rapide finis la manifestacion kaj la partoprenantoj disiĝis ĉirkaŭ la 16-a horo.



La tago ne estis tute finita ĉar ankoraŭ estis la debato ĉe la Eŭropa Parlamento. Tiu ĉi ĝuste estis iom perturbita ĉefe pro la sukceso de la “tago de pordoj malfermitaj” ĉe la Parlamento, kiu ricevis multe pli da homoj ol antaŭvidite kun 32 000 vizitintoj. Tamen, la debato estis bonnivela. Ĝin animis Gilbert Stammbach kaj la diversaj invititoj okupiĝis pri la demando “kiel eviti lingvan diskriminacion kaj ebligi multlingvismon laŭ la fundamentaj tekstoj de la Europa Unio?” antaŭ publiko de sepdeko da homoj.

La tago estis sufiĉe bone priparolita en la amasinformiloj: momento ĉe la televida kanalo France 3 Alsace, pluraj artikoloj en la regiona ĵurnalo Dernieres Nouvelles d'Alsace, unu duonpaĝo en la oficiala programo de "Strasburgo festas la 25-landan Europon". La manifestacio estis menciita ĉe pluraj radio-stacioj, interalie France Bleu, kaj la eŭska ĵurnalo Berria eĉ dediĉis tri artikolojn pri EŬROPA BUNTO.



Sebastien Erhard kaj Elodie Le Balc'h antaŭe preparis enketon por havi ideon pri la ĉefaj motivoj de la manifestacioj. Surloke, pro tempo-manko, nur dekduon da homoj oni sukcesis enketi, la ceteron oni enketis inter la partoprenantoj de la Bretonia buso.

Tamen, videblas kelkaj interesaj observoj. La ĉefa bedaŭro de la georganizintoj estas, ke partoprenis la manifestacion preskaŭ nur esperantistaj asocioj. Nu, ankaŭ pluraj partoprenintoj diris al ni, ke ili estus dezirintaj renkonti pli da asocioj pri lingvoj krom

Esperanto. Ĝuste, oni rimarkas en la rezultoj de la enketo, ke pluraj estis unue venintaj por defendi sian gepatran lingvon aŭ multlingvismon ĝenerale, kvankam ili cetere estas Esperanto-parolantoj. Sed ĝenerale, oni rimarkis, ke ĉiuj partoprenintoj estis tre kontentaj pri la tago tiagrade, ke ĉiuj deziras, ke la manifestacio reokazu dum venontaj jaroj.

Tamen, ĉu oni reokazigu ĝin samforme? ĉu en la sama loko? ĉu ĉiujare? Kelkaj proponis Bruselon, kiel ebla loko, aliaj sugestis interesan ideon: krom grandan unuigan manifestacion, oni povus organizi samtage plurajn aliajn manifestaciojn pli lokajn en kelkaj grandaj urboj de Eŭropo. Tiaj lokaj manifestacioj estus organizotaj vere kunlabore kun alilingvaj asocioj kaj ebligus al pli granda nombro da homoj partopreni la tagon EŬROPA BUNTO.

Ne hezitu sciigi al ni viajn opiniojn pri tiuj sugestoj skribante al europa.bunto@eraro.com. Videblas fotoj kaj aŭskulteblas sondosieroj pri la manifestacio en Strasburgo ĉe la retejo <http://europa.bunto.free.fr>.

Denis-Serge Clopeau, Sebastien Erhard, Elodie Le Balc'h, Gilbert Stambach.

Kunven-kalendaro

Kelkaj el la plej gravaj internaciaj renkontiĝoj ĝis la somero 2005

23-26 de septembro 2004:

15-a MKR (Montkabana Renkontiĝo), Pliskovica apud Seĥana, Slovenio.

☎ +385-(0)91-365 4626. 📧

vanja.radovanovic@ericsson.com;

www.angelfire.com/va2/Vanja.

8-9 de oktobro 2004:

Internacia Esperanto-Simpozio en Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno: Esperanto en la Uragano de Ideologioj (vidu p. 23 de la pasinta n-ro de EeD). ✉ Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 Wien, Aŭstrio. 📧 Helga.Farukuoye@onb.ac.at.

6-7 de novembro 2004:

Studsemajnfino (pluraj niveloj) en Hoek van Holland, Nederlando. ✉ Jeannette Bosse, Veldm. Montgomerylaan 361, NL-5612 BH Eindhoven, Nederlando. ☎ +41-(0)40-211 3344.

📧 hj.bosse@wxs.nl;

www.esperanto-info.nl/bonvenon/studweekesp.html.

27 de decembro 2004 ĝis 3 de januaro 2005:

48a Internacia Seminario (Aranĝo precipe por gejunuloj ĝis 25-jaraĝaj), en Wetzlar, Germanio. Kadra temo: Barato (=Hindio).

✉ Harald Fischer, Gustav-Adolf-Straße 2a, 48356 Nordwalde.

☎ +49 2573 626.

📧 is.admin@esperanto.de;

<http://www.esperanto.de/is>.

27 de decembro 2004 ĝis 3 de januaro 2005:

21a Internacia Festivalo (Aranĝo por familioj kaj personoj 25 – 55-jaraĝaj), en Magdeburg, Germanio. Kadra temo: tradicioj. ✉ Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34 303 Niedenstein, Germanio.

☎ 📠 +49-5624-8007

☎ +49-171-496 4558.

📧 HDP@internacia-festivalo.de,

www.internacia-festivalo.de/

25-30 de marto 2005:

Boulogne 2005. Esperantomemorifesto okaze de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en Boulogne-sur-Mer, Francio.

📧 boulogne2005@online.fr;

<http://boulogne2005.online.fr/eo>.

23-30 de julio 2005:

90a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno, Litovio.

✉ Litova Esperanto-Asocio, Zamenhofo 5, LT-44 287 Kaunas, Litovio. ☎ +370-37-208 503,

📠 +370-5-239 1078.

📧 litova.ea@mail.lt;

www.esperanto.lt/uk2005.

40-procenta kresko ĉe “Google”

Se oni entajpas la serĉvorton "Esperanto" ĉe la reta serĉejo Google, oni ricevas indikon pri nuntempe inter 1,1 kaj 1,26 milionoj da paĝoj laŭ la diverslandaj paĝaroj de Google. En la pasintjara aprilo la sama nombro estis proksimume 750 000 paĝoj. Tiurilate Esperanto do kreskis per 40 ĝis 50 procentoj en unu jaro.

Paĝoj en kaj pri Esperanto

Al la kresko kontribuas pluraj faktoroj – unuflanke plimultiĝas la esperantlingvaj paĝoj kaj aliflanke la paĝoj, kiuj mencias Esperanton. Krome la kresko estas parto de ĝenerala progreso de la interreto kaj eble ankau de la traserĉado de la reto pere de serĉmasinoj.

Esperantujo progresas

Sendepende de la fono estas evidente, ke la 40-procenta kresko de la paĝoj indikitaj de Google rilate al Esperanto signifas imponan progreson de Esperantujo.

Por la kreskigo de Esperantujo
www.EsperantoLand.org

3a NR (Novjara Renkontiĝo)
www.EsperantoLand.org/nr


2a SOMERE (SOmera
Mezeŭropa RENkontiĝo)
www.EsperantoLand.org/somere

Libroj – muziko – gazetoj
www.EsperantoLand.org/libroj

Renkontiĝaj mapoj
www.EsperantoLand.org/renkontighoj

Mapoj de Esperanto-grupoj
www.EsperantoLand.org/grupoj

*Lu Wunsch-Rolshoven
en [esper-inform]*



Anoncoj

Internacia Fotokonkurso

Post ses sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001, 2002, 2003) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la sepa *Internacia Fotokonkurso*.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10×15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devas atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1-a de decembro 2004.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2005.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2005.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* 2005.

Specialan premion (libroj de Sezojoj kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis 31 dec 2006 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Sukcesojn!

“El nia bretaro”

Informoj el LibroServo de DEA

Karaj gesamideanoj,
Ni rekomendas al vi du novajn librojn:

La laŭta vekhorloĝo kaj aliaj atento-kaptiloj

Legolibro kun ekzercoj kaj atenco-kapturniloj de Stefan MacGill. Ilustrita de Pavel Rak
Hungara Esperanto Asocio, Budapeŝt
prezo: DKK 70.- + afranko

“Nia laŭta vekhorloĝo jam kaptis la atenton antaŭ deko de jaroj. Ĝi vekis vastan interesiĝon kaj verŝajne ankaŭ kelkajn dormantojn. Sonigis ĝin eldoniste Nederlanda Esperanta Junularo. Ĝi jam sonadis tra du eldonoj, kun **entute 1500 ekzempleroj venditaj** – ne malbone por okcident-eŭropa eldonado.”

Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko

De Robert Phillipson, tradukita de István Ertl
Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2004
prezo: DKK 185.- + afranko

Ĉiuj partoprenintoj en la Jarkunveno de DEA en Aalborg certe memoras la tre interesan prelegon de Robert Phillipson pri la defio al la lingva politiko en Eŭropo.

Dafydd ap Fergus, ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, skribis pri la libro: “**Neptra legaĵo**, se ni preventu lingvan katastrofon en Eŭropo rapide anglalingviĝanta”.

(Se vi deziras la libron kun la aŭtografo de Robert Phillipson, bv. sendi vian mendon antaŭ la 1-a oktobro kun noto: “aŭtografo” – kaj havu paciencon, ĉar li ne ĉiam estas en Kopenhago).